# Tutmonda Skriba Ekzamensesio

Venis peto de pluraj asocioj kaj kluboj pri deziro okazigi KER-ekzamensesion per kiu ili ŝatus fermi jaran lingvokurson. Tio donus bonajn motivojn kaj celojn dum la tuta jaro por diligente lerni la lingvon kaj atingi certan nivelon.

Verŝajne en neniu malgranda loko povus kuniĝi tiom da kandidatoj, ke eblu okazigi plenan sesion kaj povu troviĝi financoj por alvenigi du ekzamenantojn.

Por tamen helpi al la ekzameniĝemaj, la ekzamena komisiono de UEA proponas la sekvan solvon:

Ni planas okazigi tutmondan, nur SKRIBAN ekzamensesion por **la 9a de junio 2012.**
La **nur skriba sesio**

1) konsistas nur el skribaj taskoj (testo pri gramatikaĵoj, skribaj memesprimoj, t.e. leterskribado kaj je C1 nivelo argumentado kaj kontrolo de 2 legitaj tekstoj. )
2) daŭras 2/3 aŭ 4 horojn respektive al la niveloj B1/B2 kaj C1.
3) signifas, ke post sukcesa ekzameniĝo la kandidatoj akiros atestilon de ITK, sed nur pri la skriba parto, kaj iam, aliokaze, se ili bezonus kaj volus, ili povus trapasi nur la parolan parton pri kiu ili havos apartan atestilon. La du ekzamenpartoj KUNE konsistigas la KOMPLEKSAN ekzamenon, sed ne necesas trapasi ambaŭ partojn por akiri atestilon.
4) kostas precize la duonon de la tuta koncerna ekzamenkotizo
5) povos okazi sen ĉeesto de du ekzamenantoj, tamen inter rigore difinitaj kondiĉoj, sub la reĝisorado de por tiu celo komisiita persono, la t.n ekzamengvidanto.
6) male al la ĝisnunaj sesioj, por aliĝi al la sesio en junio sufiĉas se en la sama loko kolektiĝos minimume 5 personoj sume el ajna(j) nivelo(j). Do, ne necesas, ke por unusola nivelo estu 10 kandidatoj.

Ni petas la kursgvidantojn kaj klubestrojn konsideri la eblon kaj se ili deziras aliĝi al la tutmonda ekzamentago, kontaktu la ekzamenkomisionon.
Je la unua kontaktiĝo necesas indiki la sekvajn informojn:

1) lando, urbo, loko de la planata ekzameno
2) laŭnivela (proksimuma) kvanto de la kandidatoj
3) nomo, kontakteblo (ankaŭ skajpa kaj telefona) de la kursgvidanto / loka organizanto
4) formo kaj intenceso de la preparo de la surlokaj kandidatoj
5) bezonataj helpmaterialoj kaj informoj
6) sugesto pri personoj, kiuj gvidos la sesion

**Proceduro de la ekzamensesio**


1) La kursvidanto/loka organizanto anoncas la intencon okazigi sesion kaj liveras la supre petitajn informojn
2) La komisiono kontrolas la kondiĉojn kaj provas trovi taŭgan gvidonton
3) Okaze de favoraj kondiĉoj la komisiono publikigas la sesion en la retejo de la ekzamenoj kaj la kandidatoj povos tie aliĝi elektornike
4) Je sufiĉe da aliĝoj la komisiono aprobos kaj fiksos la sesion, trejnos la elektitajn gvidontojn kaj faros la necesajn preparlaborojn.
5) La loka organizanto de la sesio kolektas la kotizojn kaj ĝiras la sumon al UEA
6) La komisiono sendos poŝte al la ĉefa ekzamengvidonto la materialojn
7) Okazos la ekzameno laŭ la antaŭe deciditaj horo kaj cirkonstancoj, ĉiuokaze la 9an de junio.
8) La gvidantoj fotokopios la testojn, kaj poste sendos la originalojn al  Budapeŝto, kaj ili gardos fermitaj la kopiojn ĝis la pliaj instrukcioj.

Rimarkendas, ke la poŝtokostoj kaj eventualaj kostoj de la ekzamengvidontoj, luado de ekzamensalono kaj aliaj surlokaj kostoj ŝarĝos la organizontojn kaj ne UEA aŭ ITK.

Ĉiuj aliaj informoj pri la postuloj, niveloj, regularo, kostoj ktp. troveblas en la submenuoj de la ekzamenpaĝo: www.edukado.net/ekzamenoj/ker

Kaj nun ni vidu, kiuj grupoj volas aliĝi al la mondskala ekzameniĝo laŭ la KER-sistemo.

Skribu, anoncu vin ĉe ker-ekzamenoj@edukado.net.


ATESTILO PRI LINGVA EKZAMENO
LANGUAGE EXAMINATION CERTIFICATE
SPRACHPRÜFUNGSZEUGNIS
CERTIFICAT D'EXAMEN DE LANGUE

Numero de la atestilo
Serial Number
Zeugnis-Nummer
N° du certificat

Ni atestas, ke
We hereby certify that
Hiermit wird bestätigt, dass
Nous corfirmons que

Nomo / Name / Name / Nom et Prénom

Naskiĝloko
Place of Birth
Geburtsort
Lieu de naissance

Naskiĝdato
Date of Birth
Geburtsdatum
Date de naissance

SUKCESE TRAPASIS LINGVOEKZAMENON ORIGO
HAS SUCCESSFULLY PASSED THE *ORIGO* LANGUAGE EXAMINATION
DIE *ORIGO* SPRACHPRÜFUNG ERFOLGREICH ABGELEGT
A PASSÉ AVEC SUCCES L'EXAMEN DE LANGUE *ORIGO*

Numero de la atestilo / Serial Number
Zeugnis Nummer / N° du certificat

ELTE
Idegennyelvi Továbbképző Központ
Ekzamena Centro
Examination Centre
Prüfungszentrum
Centre d'examen

ORIGÓ
Lingva ekzamensistemo
Examination System
Prüfungssystem
Examen

Loko de la ekzameno / Examination Site
/ Prüfungsort / Lieu de l'examen

Urbo
Town
Stadt
Ville

Dato de la ekzameno
Date of exam
Prüfungstermin
Date de l'examen

Lingvo / Language
Sprache / Langue
Esperanto
Esperanto
Esperanto
Espéranto

Nivelo / Level
Stufe / Niveau

Tipo / Type
Typ / Type

Prezidanto de UEA
President of the World Esperanto Association
Präsident des Esperanto Weltbundes
President de l'Aassociation Mondiale d'Espéranto

Direktoro de la Ekzamena Centro
Director of the Examination Centre
Leiter des Prüfungszentrums
Directeur de centre d'examen